



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jara aborio

30,- GM

=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Pöck. Nürnberg 81956-851

N-ro 36/77 - 14 sep 1977

Aperas ĉiusemajne

Socio-lingvistika seminario internacia

Perpignan (pp/av) - De la 18-a ĝis la 31-a de julio okazis en Perpignan, ĉe la Universitata Centro internacia seminario "Socio-Lingvistiko". Partoprenis 80 fakuloj el 12 landoj.

Dum ĝenerala kunveno s-ron René Llech-Walter parolis pri Kataluna lingvo sed li prezentis sin ne nur kiel kataluna parolanto sed ankaŭ kiel Esperanta parolanto, delegito de UEA kaj partoprenanto de multaj universaliaj kongresoj sen interpretistoj.

Dum speciala kunveno li parolis pri Esperanto kaj skizis, ĉe la nigra tabulo, la Esperantan gramatikon kun okulfrapaj ekzemploj. Prof. Vasalls, eksdekano de la Universitato de Tananarive, interesiĝis kaj petis informojn kaj klarigojn.

Prof. Olah Tibor, de la Universitato de Budapeŝto, informis, post la prelego, s-ron Llech-Walter ke, se li ne interesiĝis antaŭe pri la lingvo, estas, ĉar la esperantistoj en Budapeŝto prezentas Esperanton kiel anstataŭiganton de ĉiuj lingvoj. La delegito de UEA en Perpignan klarigis al prof. Tibor, ke kontraŭ Esperanto estas helplingvo kaj faciligas la lernadon de la aliaj lingvoj.

S-ron Llech-Walter disdonis multajn flugfoliojn kaj eĉ lernolibrojn kaj ankaŭ numerojn de "Esperanto-Actualiés", eldonitaj de la Franca Esperanto-Unuiĝo.

Grava ŝtata distingo por pola esperantisto

Krakovo (pp) - Laŭ decido de la Ŝtat-Konsilantaro de Pola Popola Respubliko, farita la 1-an de julio 1977, Stanisław Świstak ricevis Arĝentan Merit-Krucon. Tiu alta pola distingo estis atribuita i.a. pro lia 20-jara esperantisteco (1957-1977) kaj agado sur la Esperanto-kampo, dum kiu li plenumis diversajn funkciojn en la movado, i.a.: Organiza sekretario de la Suda Regiono de Pola Esperanto-Asocio (1963-1968), redaktoro de "Tamen", monata revuo de Pola Esperanto-Junularo (1964-65, 1967), prezidanto de la Vojevodio Estraro de la Filio de PEA en Krakovo (1971-1972), prezidanto de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio kaj ankaŭ prezidanto de la Redakta Komitato de "Pola Esperantisto" (1972-1976), UEA-komitato (1973-1977) kaj UEA-estrarano (1974-1977). Li estas ankaŭ membro de la redakta komitato de "Paco", oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Dum tiuj jaroj li faris kelkdekojn da prelegoj pri Esperanto kaj la movado kaj gvidis multajn kursojn de Esperanto.

La distingan enmanigis nome de la Ŝtat-Konsilantaro la Prezidanto de la Urbo Krakovo la 20-an de julio 1977.

Nepre uzi Esperanton

El la Informilo de Ligo Argentina de Esperanto "Argentina Esperantisto" 1/77 ni citas: "Ni komprenas ke estas grava afero por la Movado varbi novajn samideanojn, sed pli grave ol tio estas ke la nunaj esperantistoj ne deflankiĝu de la signita celo, ke ili persistu en sia esperantisteco kaj uzu la Internacian Lingvon laŭ siaj eblecoj: per legado de libroj, per letterskribado, dum personaj kontaktoj. Se oni ne povas vojaĝi eksterlanden (kaj nuntempe la daŭra inflacio al tre malmultaj permesas tion), oni subtenu korespondadon kun alilandanoj....

Nepre uzi Esperanton! Jen la plezura devo de ĉiu konscia Esperantisto!"

Pli da esperantistoj ol poloj?

Analizo de la korespondaĵoj al Radio Roma 1976

Kvankam malfrue, mi ĵus sukcesis ricevi kopion de referaĵo, farita de la "Koresponda servo" de la Itala Radio pri la korespondaĵoj de oksterlandaj aŭskultantoj. Mi opinias, ke ĉi entenas plurajn donitaĵojn, kiuj devus pripensigi la esperantistojn.

La unua interesa afero estas, ke en la tuta jaro 1976 Radio Roma ricevis, en diversaj lingvoj, apenaŭ 8.604 korespondaĵojn - tio montras, ke entute ne estas malfacile influi per Esperantlingvaj korespondaĵoj, ĉar la totalo ja estas tre malgranda: oni pensu, ke nur la Esperanto-redakcio de Radio Varsovio ricevas, ĉiujare, preskaŭ 5 000 leterojn, kaj ke la korespondado de Vatikana Radio estas almenaŭ 4-oble kompare kun tiu de Radio Roma.

La Esperantlingvaj korespondaĵoj, laŭ la oficiala statistiko, estis en 1976 iom malpli ol 9 % el la totalo. (La oficiala cifero 693 kernas, kompreneble, nur leterojn, kartojn kaj simile, dum ne estas enkalkulitaj la presaĵoj; krome, la oficialaj ciferoj iom diferencas el tiuj siatempe registritaj de la Esperanto-redakcio, precipe ĉar kelkaj korespondaĵoj alvenintaj ĉe la limoj de la jaro 1976 estis kalkulitaj en la antaŭa aŭ en la posta jaro, depende de la dato, en kiu ili atingis la Esperanto-redakcion.)

Jam tiu procentaĵo (9) estas grava atingo, des pli se oni konsideras, ke la Esperanto-programo surondiĝas nur unu fojon en la semajno, dum la aliaj lingvoj havas je dispono ankaŭ po multaj horoj en ĉiu tago. Sed la procentaĵoj fariĝas eĉ pli interesaj, se oni konsideras nur Eŭropon, al kiu la Esperanto-programo estas direktata: la Esperantlingvaj korespondaĵoj konsistigas 14,4 procentojn el tiuj de "okcidenta" Eŭropo kaj 48,9 procentojn el tiuj de "orienta" Eŭropo!

Dividante laŭ landoj, oni malkovras vere kuriozajn faktojn: ekzemple, la Esperantlingvaj korespondaĵoj konsistigas 48 % el la totalo de Ĉeĥoslovakujo (al kiu direktiĝas du programoj, en la ĉeĥa kaj en la slovaka), preskaŭ 81 % el Pollando (tiel, ke se oni fidus je statistikoj oni povus supozi, ke en Pollando...ekzistas pli da esperantistoj ol da poloj!), 76 % el Hungarujo, 62 % el Sovetunio, kaj eĉ...36,6 % el Francujo! Ankaŭ por aliaj landoj, la procentaĵo de la Esperantlingvaj korespondaĵoj superas 20 % (Bulgario 66,6 % - Portugalio 42 % - Nederlando 35 % - Jugoslavio 33 % - Norvegio 32 % - Danlando 30 % - Svislando 22 %). Estas ankaŭ menciinde, ke la solaj 4 korespondaĵoj, kiuj dum 1976 alvenis al Radio Roma el Popola Ĉinio, estis ĝuste en Esperanto! Oni preskaŭ povus fanfaroni, ke en Ĉinio oni kutime parolas Esperanton.....

La referaĵo substrekas la grandan diferencon, kiu ekzistas inter "okcidentaj" kaj "orientaj" landoj koncerne la korespondaĵojn en Esperanto, kaj emfazas la fakton, ke el aliaj mondopartoj la Esperant-lingvaj leteroj estas tre sporadaj. (Jen plia kaŭzo, por ke el aliaj kontinentoj oni skribu, postulante Esperantlingvan programon ne fermitan Eŭropo). Meniu letero venis el Islando; supozeble, la referaĵo por 1977 notos kun plezuro, ke dum ĉi tiu jaro fine oni ekaŭskultis Radion Roman ankaŭ en tiu fora lando, kaj ke tion oni faris....en Esperanto!

Fina kuriozaĵo: el Japanujo alvenis 2 865 leteroj, kvankam Radio Roma elsendas al Japanujo...en la angla, kaj multegaj aŭskultantoj emfazas, ke ili konas la anglan nur tre supraĵe. Antonio De Salvo

Citaĵo el Leterkesto de ORF-Vieno

"Pilo-Press" n-ro 34 dediĉas dankinde 7 liniojn al karakterizo de niaj lastaj programoj. N-ro 35 prezentas vivantecon raporton, bazitan sur personaj impresoj, pri la eminente sukcesinta Kongreso de la katolikaj esperantistoj en Ĉenstoĥovo, el la plumo de d-ro Jozséf Kondor.

Enketo de Pola Radio

Varsovio (pp) - Per multobligita letero la Esperanto-redakcio de Pola Radio sin turnas al kelkdeko da geaŭskultantoj kun la peto esprimi opinion pri la programoj. Pilo-Press citas el tiu letero kaj petas la legantojn skribi sian opinion al la redakcio de Pola Radio. Volonte ni ankaŭ publikigas tiujn opiniojn de legantoj, kiuj sendas al ni kopiojn de tiuj leteroj.

Jen la citaĵo:

"Por ni estas tre grava via opinioesprimo, ĉar nun ni celas plian, konsiderindan plivastigon de la Esperanto-temaro en nia programo - kaj ĉi-koncerne treege valoraj estas la rimarkoj de niaj aŭskultantoj.

Niaj ĝisnunaj, ĉiusemajnaj Esperanto-programeroj:

- 1) "Esperanto-ekspreso", 2) "Leterkesto", 3) "Koncerto kun bondeziroj"/ "Aŭskultantoj por aŭskultantoj", 4) "El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio"

Dusemajnaj: 1) "Trarigardo de la Esperanto-gazetaro"

Ĉiumonataj: 1) "Anguletoj de la nevidantaj esperantistoj"

Ekde aŭgusto - inkluzive ĝin - ni enkondukis novajn ciklojn de Esperanto-temaj elsendoj. Jen ili:

- 1) La kreintoj kaj elstaraj agantoj de la pola esperantista movado
- 2) Polaj sciencistoj kaj homoj de la kulturo pri Esperanto
- 3) Pola literaturo en Esperanto-tradukoj
- 4) Polaj kreantoj-esperantistoj - personsiluetoj kaj fragmentoj de verkoj
- 5) Intervjuoj kun veteranoj de la pola esperantista movado
- 6) Aŭskultantoj proponas - ni emisias -(kadre de "Leterkesto" aŭ aparte)
- 7) Polaj esperantistoj pri sia lando kaj pri sia laboro

Oni klare vidas certan nesufiĉon de la internacia Esperanto-problemaro, malgraŭ la emisiado de la "Esperanto-ekspreso".

Ni afable petas pri rimarkoj koncerne la unuopajn erojn ĝisnunajn, kiel ankaŭ novajn erojn, kiujn - laŭ via opinio - oni devus enkonduki en la programon.

Ni petas ankaŭ pri rimarkoj koncerne la enhavon, kiel ankaŭ la formon de la emisiataj de ni Esperanto-temaj programeroj. Se estas eble, ni petas, ke vi bonvolu skribi viajn rimarkojn sur unu flanko de la folio - tio faciligos al ni nian laboron.

Ni samtempe petas sendi al ni informajn aŭ aliajn materialojn, kiuj via opinio taŭgas por utiligo en nia programo."

Jen la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Esperanto en Aŭstra Televido

La elsendo de la Aŭstra Televido, Dua Programo, kiun ni anoncis por la 5-an de septembro, ne okazis. Sed ni jam tiam avertis, ke eventuale ĝi okazos nur la 19-an de septembro.

Do, la elsendo pri Esperanto kaj la Internacia Esperanto-Muzeo, nun okazos lunde, la 19-an de septembro, je la 20,55 horo, Dua Programo kadre de la serio "Eintritt frei".



Esperanto-kurso en Oelde

Oelde (pp) - En la popolaltlernejo de Oelde, FRG, komenciĝis Esperanto-kurso por komencantoj. Gvidas ĝin Manfred Retzlaff.

MEM-kunveno

Elmstein-Iggelbach(pp) - La sekcio de Federacia Respubliko Germanio de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM) okazigas de la 7-a ĝis la 10-a de oktobro 1977 "Internacian Konferencon de la Pacaktivuloj - IKOPA '77" sub la temo "Paco, Malarmiĝo kaj Popola Interkompreniĝo" en la turisma komunumo Elmstein-Iggelbach proksime al Neustadt/Weinstr. Informojn donas: Roland H. Hegen, MEM-sekcio, Schlossgasse 30, D-6731 Elmstein 2.

Reaĝoj - opinioj

"Multajn salutojn de Migrad-tago en Mainburg/Hollertausendas la Munkenaj esperantistoj J. Weidacher, Friedrich B. Hilpert, J.A. Fachter kaj aliaj "

Estis evidente ke la redaktoro de la sendaĵo, Jürgen Althoff, eĉ ne trovis ke necesas informiĝi objektive pri Esperanto. Kior li faris el la tuteco de la fakte refistrita materialo estis simple skandalo kaj kreas dubojn pri la neŭtraleco de la ĵurnalisto. Mi samopinias kun s-ro R. Fischer el Nordwalde (PP n-ro 34/77, p. 3) ke oni ne plu akceptu televidajn elsendeblocojn kun simila misprezento.

S. Tucker, Augsburg

Abonu la PILO-eldonaĵojn:

Eŭropa Esperanto-Revuo, PILO-PRUSS kaj EKD por 50,- GM